

Bulgara **ESPERANTISTO**





ENHAVO

* Centjariĝo de la bulgara libero . . .	1
* 63-a Universala Kongreso de Esperanto . . .	2
* La liberigo de Bulgario estis en la koro de la rusa popolo . . .	3
Ivan Vazov. Rusio. Tradukis S. M. Simonov . . .	4
* Al la herooj de Ŝipka. Tradukis Antonina Tonti — Volkova . . .	4
Ljudmil Stojanov. Al la rusa popolo. Tradukis As. Grigorov.	5
N. I. Danĉenko. Nokta batalo	5
Ivan Severnjaŝki. Rozoj por Julija Vrevskaja	8
Nevena Nedelĉeva. Antaŭ cent jaroj . . .	9
* Verda tabulo	11
* Esperanto-kursoj	12
* En niaj korespondaj kursoj nun . . .	12
* Vintraj feriaj E-kursoj en Vraca . . .	12
* Laŭdinde!	13
* Zamenhof-celebroj	13
K. Ivanov. Jubilea celebrego de Vasil Bozarov	14
Todor Jivkov. Salutletero al Vasil Bozarov	15
* Akademiano Vladimir Georgiev 70-jara	15
Ljudmila Paspaleeva. Returnen! . . . Maldekstran! . . . Maldekstran! . . .	III
* Informoj pri la Internaciaj E-kursoj en Burgas kaj pri la Esperanto-kursoj kaj Ferioj en Druĝevo	IV

Sur la kovrilpaĝo :

La plej nova monumento de la bulgara-rusa batalamikeco — panoramo „La epopeo de Plevna 1877“, inaŭgurita en Plevna la 10-an de dec. 1977 (vd. n-ro 1 de „BE“)

La decidaj bataloj ĉe la montopasejo de Ŝipka inter rusoj kaj bulgarioj unuflanke kaj turkoj aliflanke (aŭgusto, 1877)

Malofte oni renkontus du popolojn, kies kulturoj estas tiel proksimaj kaj parencaj, kiuj dum sia historio submetis sin tiel daŭre kaj tiel profunde al reciproka influo, kiel la bulgara kaj la rusa popoloj.

La rusa-bulgara amikeco datiĝas de pli ol 10 jarcentoj. Komence la influo estis de sudo al nordo, de Bulgario al Rusio, ĉar Bulgario, najbara al Bizanco, pli frue atingis konsiderindan nivelon de kultura florado kaj kune kun la slava skribo transdonis al siaj nordaj fratoj ankaŭ siajn kulturajn atingojn. Sed poste, kiam la bulgara popolo sub la sultana kaj fanariota jugoj falis en plenan mallumon, unu potenca kultura fluo direktiĝas de nordo al sudo kaj la spirita renaskiĝo de la bulgara popolo efektiviĝas ĉefe sub la influo de Rusio kaj la rusa humanismo, sub la influo de la ideoj pri politika libereco kaj nacia sendependeco,

kiuj penetris Bulgarion kune kun la rusa armilo.

Ĝuste en tiu periodo — la periodo de la bulgara renesanco — estis metitaj la fundamentoj de la rusa-bulgara amikeco, kiun neniu ŝanĝemoj de la historio povis kaj povos iam ajn detrui.

La liberigo de la bulgara popolo el turka jugo pere de la rusa armilo faris la rusan popolon plej proksima, plej amata, plej estimata kaj plej aŭtoritata por ĉiu bulgaro.

Mi ne konas iun ajn landon en la mondo, en kiu la popola amo kaj danko al alia popolo estas enkorpiĝintaj en tiom multaj, sanke konservataj kaj respektataj monumentoj, kiel en Bulgario, kie ĉiu urbo, ĉiu parko, ĉiu altaĵo kaj ĉiu spano da tero atestas pri la senlima amo kaj dankemo de la bulgara popolo al ĝiaj liberigintoj.

Vasil KOLAROV, 1947

**100-JARIĜO DE LA BULGARA LIBERO**

La 3-an de marto la tuta bulgara popolo, la frata rusa popolo kaj ĉiu amikoj de nia lando solene celebros la 100-an datrevenon de la liberigo de Bulgario el osmana jugo. En la historio de la bulgara ŝtato tiu ĉi evento el la fino de la pasinta jarcento reliefigas per aparta brilo kaj grandega signifo. Fina rezulto de kelkjarcentaj bataloj de la bulgara popolo kaj de la decida helpo de la rusa popolo, la liberigo starigis la komencon de nova periodo en la disvolviĝo de Bulgario.

La kaŭzoj kaj la karaktero de la Liberiga Milito de 1877—1878 j. ne povus esti korekte komprenitaj kaj pritaksitaj, se oni ne ligus ilin kun la longa kaj heroo naciliberiga batalo de la bulgara popolo. Nefleksebla antaŭ la fremda osmana konkerinto, firme defendanta sin kontraŭ ĉiu spirita kaj politika asimilado, la bulgaro montris miraklojn de vera patriotismo kaj heroismo dum la 500-jara nigra jugo. Ĝia spirito restis neŝanceblebla, ĝia kredo je la fina venko ne perdiĝis eĉ en la plej pezaj momentoj. Nedisputebla estas la bonefika influo de la rusa popolo sur la historia sorto de la bulgaroj dum la jugo. Ĝi donas ĉiuf flankan kaj aktivan helpon al la revolucia, kleriga kaj eklezia batalo de la sklavigita popolo.

La Aprila Ribelo de 1876 j. estas tiu apogeo de la naciliberiga batalo de la bulgaroj, kiu kreis la kondiĉojn por aktiva interveno de Rusio helpe al la bulgaraj fratoj. La sciigoj pri la sanga frakaso de tiu ribelo, pri la grandaj perfortoj kaj kruelaĵoj super la bulgara loĝantaro aktivigis la nedormantan konscion de Rusio kaj Eŭropo.

La Liberiga Milito de 1877—78 estas unu el la plej komplikaj diplomaciaj, politikaj kaj militaj eventoj en la historio de Rusio, la Otomana Imperio kaj la bulgara popolo. Ĝi nediskuteble havas la kvalitojn de vera helpo al la multsuferinta bulgara loĝantaro. Tial kun deziro kaj entuziasmo, inspirataj de sento de vera frateco, en ĝi partoprenis la rusaj soldatoj kaj oficiroj, ankaŭ rumanaj kaj finnaj soldatoj kaj oficiroj. Tio antaŭdifinas ilian bravecon kaj eltenemon en la bataloj apud Pleven, Šipka, Stara Zagora kaj aliloke ĉe plej pezaj kondiĉoj — frostoj kaj neĝo, neĝventegoj kaj netraireblaj lokoj. La heroismo de la bulgaraj volontuloj ankaŭ estas alta supro en nia historio.

Kontraŭuloj de nia liberigo estis Anglio, Francio, Germanio kaj Aŭstrio-Hungario. Ties registaroj deklaris sin defendantoj de la Osmana Imperio, kulpigante Rusion pri enmiksiĝo en ĝiajn internajn aferojn. Iliaj agoj havas la celon reteni la disfalon de la ekonomia kaj politika sistemoj de la putranta osmana feŭdismo kaj destini la bulgaran popolon ankoraŭ longe suferi sub la kruela jugo. Post la milito tiuj registaroj provis — pere de la Berlina Kongreso — limigi la justajn kaj progresemajn rezultojn de la milito.*

Finiginte per nacia liberiĝo de la bulgara popolo kaj per kreo de nova bulgara administracio, la Liberiga Milito estas progresema evento en nia nova historio. Por Bulgario ĝi ludis la rolon de burĝa-demokratia revolucio.

La granda rusa popolo faris justan kaj noblan agon, kiun dum jarcentoj atendis ĝia malgranda frato — la bulgara popolo.

La kune verŝita sango de rusaj armeanoj kaj bulgaraj volontuloj apud Sviŝtov, Pleven, Sipka, Sejnovoo, Stara Zagora kaj en aliaj memorindaj lokoj ankoraŭ pli forte cementis la fratan bulgara-rusan amikecon. Tiu amikeco daŭris ankaŭ post la Liberiĝo, dum la periodo de kapitalismo, kiam nia popolo batalis kontraŭ la kapitalisma-faŝisma subpremo kaj firme kredis je la helpo de Sovetunio. Kaj tiu helpo venis. Dank' al ĝi la bulgara laborpopolo akiris duan liberiĝon.

En la historio de la popoloj maloftas la okazoj de tiom longa kaj frukto-dona amikeco ĉe solvo de grandaj, historie progresemaj kaj justaj taskoj. Maloftaj en la historio estas la ekzemploj pri frateco kaj senprofita helpo fare de granda al malgranda popolo, batalanta por nacia kaj poste por socia liberiĝo. K-ĉo Todor Ĵivkov difinis la bulgara-rusan kaj bulgara-sovetan amikecon kiel amikecon de jarcentoj por jarcentoj. Tiu difino havas profundan sencon kaj riĉan enhavon. Ĉiuj generacioj de la bulgara popolo sankte gardis kaj gardos tiun amikecon.

La bulgaraj esperantistoj klinas la kapojn antaŭ la grandega heroaĵo kaj ofero de la rusaj batalintoj kaj bulgaraj volontuloj, pereintaj por nia liberiĝo, kaj donas solenan promeson sankte gardi ilian aferon.

* Berlina Kongreso — konferenco, kunvokita en junio 1878 de Anglio kaj Aŭstrio-Hungario, kiun partoprenis ankaŭ Germanio, Francio, Italio, Rusio kaj Turkio. Sub la premo de Anglio kaj Aŭstrio-Hungario la konferenco reviziis la packontrakton de San Stefano (1878) kaj dispartigis la ĵus liberigitan Bulgariion, kreante kondiĉojn por estontaj malamikaj rilatoj inter la balkanlandaj popoloj.



63-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varno (Bulgario), 1978.07.29—08.05

*Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Botterdam,
Nederlando*

*Adreso de LKK: bul. Ĥristo Botev 97,
BG-1303 Sofia*

Internacia lingvo — Internacia edukado. Jen la temo de la 63-a UK. Ĝin aparte inspiras la Rekomendo pri Edukado de Unesko, kiu eliris kune kun la decembra numero de revuo „Esperanto“. Kongresanoj povos kontribui siajn ideojn al la Kongreso pri apartaj facetoj de tiu temo dum diskutrondoj: diversaj formoj de E-lernado (memlernado, studrondoj, korespondaj kursoj); kiel Esperanto povas kontribui al plenumo de la uneska rekomendo; la problemoj de komencantoj en la E-parolanta komunumo; lernado de Esperanto ĉe pensiuloj; la eblecoj kleriĝi kadre de E-lernado.

Novaj premioj por fotistoj. La fotografia branĉo de la Belartaj Konkursoj aljuĝos, aldone al la kutimaj monpremioj, la jenajn objektojn tiucele donacitajn de la belga entrepreno Agfa-Gevaert: unu kameraon Microflex 300 por 8-milimetraj filmoj; unu poŝformatan fotilon Agfamatic 4008; unu poŝformatan fotilon Agfamatic 2008; dek kvin 90-minutajn sonkasetojn; dek altfidelajn sonbendojn po 360 m longajn. La maniero dividi la premiojn estas decidota.

Artistoj sin anoncu. Kantistoj, aktoroj, deklamistoj kaj aliaj artistoj de la viva prezento skribu pri siaj talentoj al la membro





Malnova pentraĵo:

La suferanta fratino Bulgario sub la protekto de sia potenca fratino Rusio

LA LIBERIGO DE BULGARIO ESTIS EN LA KORO DE LA RUSA POPOLO

F. M. DOSTOEVSIIJ

La fama rusa verkisto F. M. Dostoevskij (1821—1881) estis profunde skuita de la kruelaĵoj, faritaj de la otomanaj sklavigantoj dum la frakaso de la Aprila Ribelo (1876). Li senmaskigis la kulpantojn pri la suferoj de la bulgara popolo kaj vipis la indiferecon de „civilizita“ Eŭropo. Indignita kontraŭ la malpuraj intrigoj de la reakciaj okcidenteŭropaj regantoj, kiuj fiaskigadis la klopodojn de la rusa registaro solvi per pacaj rimedoj la bulgaran problemon, Dostoevskij alvokis arde: „Rusio estas devigata helpi la slavojn, ĝi ne povas lasi ilin je la bonvolo de la eŭropa egoismo... Ni eligu la glavon por defendi la subpremitajn bulgarojn.“

En sia „Taglibro de la verkisto“ (aprilo 1876 — julio-aŭgusto 1877) li skribas:

„Kiam oni eksciis pri la reĝa decido, la popolo invadis la preĝejojn en la tuta lando. Kiam oni legis la manifeston, la homoj krucsignadis kaj ĉiuj salutadis unu la alian pri la milito... La vilaĝanoj oferis laŭ siaj ebloj monon, veturilojn, kaj ĉiuj ekkriis kiel unu homo: „Kion valoras tiuj oferoj... Ni ĉiuj foriros militi!...“ La tuta popolo levigis por la vero, por la sankta afero kaj foriras militi... Demandu la popolon, demandu la soldaton, kial ili levigas, por kio

de LKK respondeca pri artaj aranĝoj, s-ano Kiril Draĵev, per la adreso de LKK. Ekzistas ebleco ricevi honorarion kaj eventuale apartan subvencion por helpi la pagon de restadkostoj.

Karavanoj tra Brazilo. De 17—22 de julio 1978 okazos la Unua Latinamerika E-Kongreso en Marilia, Brazilo. Jam oficiale aliĝis al tiu kongreso la landaj movadoj de Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Ekvadoro, Kolombio, Peruo, Urugvajo kaj Venezuelo.

De Nordameriko kaj Eŭropo estos karavanoj al la Latinamerika Kongreso en Brazilo (la lando de la 66-a UK en 1981 j.), kiuj poste iros al Varno por la 63-a UK.

Japana kaj svisa karavanoj. Japana E-Instituto organizas 20-tagan karavanon, kiu iros de Tokio tra Dubrovnik, Beogrado kaj Sofio al UK en Varno kaj reiros postkongrese al Tokio tra Budapeŝto, Prago kaj Frankfurto.

Karavano el Zuriĥo inkluzivos loĝadon apudstrandan en Oraj Sabloj (Zlatni Pjasaci) kaj kvartagan postkongresan turisman veturadon tra Bulgario. Detalojn oni ricevas de s-ro Otto Walder, Esperantoweg, CH-8590

Romanshorn, Svislando.

Favoraj kondiĉoj por aŭtomobilistoj. Eksterlandaj aŭtomobilistoj en Bulgario ne bezonas doganajn dokumentojn por siaj aŭtoj, sufiĉas la ŝofora rajtigilo de la koncerna lando. La blua kaj verda asekurkartoj validas en Bulgario. Oni ricevas senpagan helpon ĉe malgrandaj paneoj, kaj, okaze de akcidento, oni ricevas senpagan kurachelpon ĝis forigo de vivdangero.

Ĉu vizo necesas? Civitanoj de jenaj landoj ne bezonas vizon por Bulgario: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Germana DR, Hindujo, Hungario, Islando, Jugoslavio, PR Mongolio, Norvegujo, Pollando, Portugalio, Rumanio, San-Marino, Soveta Unio, Svedujo kaj Tunizio. Civitanoj de aliaj landoj sin turnu al bulgara konsulejo aŭ ambasadejo.

Jam pli ol mil. Jam (ĝis la 10 de januaro) registriĝis 1024 kongresanoj, kiuj ŝparis, aliĝante dum la unua periodo. Se vi volas ŝpari, ne atendu ĝis la tria (kiu finiĝas je la 20 de majo). La kongreskotizoj de la dua periodo validas ĝis la fino de marto.

ili foriras kaj kion ili celas per la komenci-
ginta milito — kaj ĉiuj diros al vi kiel
unu homo, ke ili foriras. . . por liberigi la
subpremitajn fratojn kaj neniu pensas pri
okupado.

Jes, ni nun, ĝuste en tiu ĉi milito, pru-
vos nian ideon pri la estonta rolo de Rusio
en Eŭropo, ni pruvos, ke liberiginte la
slavajn landojn, ni eĉ peceton ne prenos por
ni (kiel oni jam revas en Aŭstrio), sed male,
ni atentos, ke ili vivu en konkordo, kaj ni
defendos ilian liberon kaj sendependon,
se necese, kontraŭ tuta Eŭropo.“

V. M. GARSIN

La elstara rusa verkisto V. M. Garŝin
(1855—1888) renkontis kun entuziasmo la
proklamon de la Liberiga Milito, kiu trafis
lin studento en Peterburgo. Tri tagojn post
tio li skribis al sia patrino:

„Panjo, mi ne povas kaŝi min malantaŭ
la muroj de la Instituto, kiam miaj sam-

Ivan Vazov

RUSIO

(fragmento)

Saluton, ho Rusio forta —
vi de l'justeco la reĝin'!
Eksaltu laŭ la vol' de l'sorto
kaj venu — jen ni vokas vin!
Vin vokas tuta Bulgario:
jen via hor' — por la estont'
plenumi rolon de mesio,
plej grandan rolon en la mond'!
Vi estas ĉiam glora, kara,
kaj inter ĉiuj senkompara:
kvinonon preskaŭ de la mond' —
popoloj, regnoj, oceanoj, —
signifas via horizont'.
Kaj ĉiuj malamikaj planoj
fiaskis, ĉar vin gardas Dio
kaj vin timigis ja nenio.
Pro tio ja ne venkis vin
Mamaja-han' kaj Bonaparto.
La malamikoj timas vin,
eĉ rigardante vin sur karto.
Por ni vi ĉiam sankta estas,
ni ĉiam viaj filoj restas;
ni vin atendas, ho Rusio,
ĉar estas vi por ni mesio!

22. XI. 1876

El la bulgara: S. M. Simeonov

«Ili, agloj de norda ĉielo, idoj de la grandega rusa lando, inspiritaj de la diino de
homeco, justeco kaj libereco, gvidataj de la genio de l'venko, trafilis barbarojn kaj ebenojn,
riverojn kaj marojn kaj kuraĝe alteriĝis sur la belan kaj fieran Balkanon. Ĉi tie, en la
sklavigita dum jarcentoj bulgara lando, ili trapikis per siaj lancoj kaj bajonetoj la turkan
tiranecon. . . Per la klingoj de siaj glavoj ili distrancis jarcentajn katenojn, kaj per siaj
kanonoj detruis ĝisfundamente la kvinjarcentan fortikon de peza sklava ŝarĝo. En la singla
batalo sur bulgara tero ili sinofere disversis sian sangon kaj lasis siajn ostojn sur frata
tero por la libero kaj la feliĉo de la bulgara popolo, forgesita de la jarcentoj, de la dioj kaj
de la potencaj popoloj.»

(El surskribo sur memortabulo ĉe la ostogardejo
en la Muzeo-Parko „Skobelev“ — Pleven)

aĝuloj jam elmetas siajn fruntojn kaj brustojn
al la kugloj!“

Garŝin fariĝis volontulo en la rusa armeo.
En siaj „Leteroj el Bulgario“ li rakontas pri
la senlima ĝojo de la bulgaroj dum renkon-
tiĝo kun siaj rusaj liberigantoj:

„La bulgaroj el Sviŝtov renkontis niajn
kozakojn kun entuziasmo, kun larmoj.
La infanoj sin ĵetadis al iliaj koloj.“

L. N. TOLSTOJ

La maldormanta konscienco kaj humana
koro de la koloso de la rusa kaj monda lite-
raturisto L. N. Tolstoj (1828—1910) ne povis
resti indiferenta al la tragedio de la bulgara
popolo post la frakaso de la Aprila Ribelo
kaj laŭtigis voĉon por ĝia defendo. Mal-
graŭ ke li negis la verŝadon de sango, li
rilatis pozitive al la Liberiga Milito: „ . . la
rusa popolo estas preta leviĝi kiel unu homo
kaj oferi sin por siaj subpremitaj fratoj;
tio estas granda paŝo kaj garantio pri forto...“

*Milittrupo de
III Ukraina Fronto*
septembro 1944*

AL LA HEROOJ DE ŜIPKA

(Memortabulo en la maŭzoleo)

For de Rusi' vi mortis tie ĉi
por la liber' de viaj fratoj-slavo;
batali ĝis la mort' vi ĵuris al patri' —
ĉi ĵuron vi plenumis per la glavoj.

Vin ne haltigis timo aŭ danĝer'
dum la batalo — sankta, inda, prava.
Nun dormu, rusaj agloj, en la ter':
la idoj multobligas gloron vian!

Memoras ni heroojn de Rusi',
kaj nun post avoj venis idoj.
Nun kun kuraĝo neniigos ni
faŝistojn — malamikojn sangavidajn!

El la rusa: A. Tonti — Volkova

* Trupoj de la III Ukraina Fronto liberi-
gis Bulgarijon elsub faŝista jugo en 1944 j



AL LA RUSA POPOLO

Kiel Balkan¹ — malserena hajduto² —
staras gardante en blua ĉiel',
tiel pri ni en terura minuto
pensas la rusa popol' kun fidel'.

Patroj pri Ŝipka³ kaj Pleven⁴ memoras.
Rusa sang' lumas — papavoj sur kamp'.
«Jen ili venas!» — Knabinoj dekoras
junajn kozakojn per flora ornam'.

Bardoj popolaj pri Gurko, Stoletov⁵
kantas dum festoj kun amo en kor'.
Junaj virinoj kun ŝpinbastonetoj
gloras la rusojn en sia memor'.

Jugen obskuran per lanco vi boras,
vivon heroldas en plena liber':
fonto vivanta, ho rusa popolo,
estas ja via homeco kaj ver'.

Kiu al vi laŭ braveco egalus,
laŭ amikeco, fidelo, maltim'?
En kadukecon senpovan mi falus,
sen amo al vi, se ne konus mi vin.

Mankas pli saĝa ol rusa verkpovo,
mankas pli bela ol rusa parol',

ĉio sublima — necesa kaj nova —
venas de ĝi — de popol' al popol'.

Ĉu ni elirus el fund' katastrofa
sanaj kaj fortaj por dua jam foj'?⁶
Ĉu ni nun kantus per kanto helstrofa
en libereco, honoro kaj ĝoj',
se nin ne savus la rusaj gefratoj,
rusaj gefratoj sub ruĝa standard',
kun la martelo kaj serpo soldatoj,
frunte kun hela ruĝstela kokard'?

Ili alvenis, etendis la manon,
ĉion pardonis al ni kun sincer' —
estas la rusa koler' uragano,
amo de l'ruso — impeta river'.

Sento honesta, amika kaj ama
vivos eterne, sen lim' kaj sen fin'.
La rusa ver' estas vero humana —
kun ĝi mi kreskis, edukis ĝi min.

Kiel Balkan' — milserena hajduto —
staras gardante en blua ĉiel',
tiel pri ni en terura minuto
pensas la rusa popol' kun fidel'.

El la bulgara: Asen Grigorov

¹ Balkano — Balkan-montaro.

² Hajduto — batalinto kontraŭ la otomana juko.

³ Ŝipka — montopasejo en la Balkano, famiginta pro streĉaj kaj decidaj bataloj dum la Liberiga Milito en 1877 j.

⁴ Pleven — urbo kaj fortikaĵo konkerita de la Rusa Armeo post pezaj bataloj kaj kelk-

monata sieĝo en 1877.

⁵ Gurko, Stoletov — rusaj generaloj, famigintaj pro siaj gravaj venkoj super la turka armeo.

⁶ „Por dua jam foj“ — la bulgara popolo estis dufoje liberigita de la rusa popolo: en 1878 (el sub otomana juko) kaj en 1944 (el sub monarko-faŝisma juko).

I. N. Danĉenko

NOKTA BATALO

Fragmento el la libro „Trans Danubo“

Tiun ĉi nokton, kiam nia roto fosis tranĉeojn, ne okazis batal-agoj en la vera senco de la vorto, sed tamen nia regimento bone sin tenis. La maljunulo Tokmakov estis kontenta kaj ripetadis:

— Ne grave, bravaj estas niaj junuloj!

Post du tagoj foje ĉe vesperiĝo oni ricevis el la stabejo ordonon okupi la unuan el la montosuproj, troviĝantaj antaŭ ni, kie la turkoj havis tran-

ĉeojn, kaj fortikiĝi tie. Dum la tuta aŭtuna nokto regis tiel densa nebulo, ke la skoltoj, senditaj por kolekti informojn, eraris la direkton kaj trafis ne tie, kien oni ilin sendis. Ĉe la mateniĝo en niaj vicoj ekbolis febra malkvieto. La soldatoj senpacience purigis la fusilojn. Meminiciative, sen ordono, ili ŝanĝis sian tolaĵon kaj vestiĝis per ĉio, kio estis pli bona. . .

La tago estis kruda, malluma, frosta, kian ni dum la tuta aŭtuno ne havis. Oni preskaŭ perdis la vojon kaj la vetero ne povus esti pli mal-

I v. N e m i r o v i ĉ — D a n ĉ e n k o, en sia junaĝo partopreninto en la Liberiga Milito, poste elstara verkisto kaj dramisto.

bona: la turkoj nenion rigardos, nenion vidos, ĝis ni ne puŝiĝos kun ili nazon kontraŭ nazo. Ĉio kunfandiĝis kaj perdiĝis en la nebulo. Kiam ni stariĝis en fronto, antaŭ ni jam staris duonroto de pafistoj. Ili estis vokitaj por ĵeti sin kiel unuaj kontraŭ la turkajn tranĉeojn. . . Ni, novuloj, kun pasia scivolo fiksis la rigardon sur ili, dezirante legi ion sur tiuj ordinaraj, simplaj vizaĝoj. Oni rimarkis nenian fajreton de montrataj entuziasmo, heroeco, kiujn ni kutimas imagi pri la „mirindaj herooj“, sed ĝuste tiu ĉi ordinareco faris des pli fortan impreson. Ĝi efikis rekte sur la koron. „Tute kiel ni!“ — oni povis nevole diri pri ĉiu el ili. „Do ni ankaŭ povus esti sur ilia loko kaj fari la samon!“ Sub tiu ĉi modesteco oni sentis la ĉeeston de la vera rusa braveco — ne brua kaj fanfarona, — kiu por ili fariĝis same proksima kaj intima kiel la griza soldatmantelo kaj la kampada tendo.

— Hm, kion, bravuloj, hodiaŭ ni ja ne kompromitiĝos! . . — diras generalo Skobelev kaj komencas gaje konversacii kun ili.

— Ni penos, Via Ekscelenco! . . . Sed tion „ni penos“ ili diras, mem ne havante klaran ideon pri ĝia senco.

Skobelev ridetas kaj atente okulfiksis la antaŭ li starantajn nigrajn figurojn. Li fiksis la rigardon, atente aŭskultas, kvazaŭ laŭ ilia voĉo li decidus, kiom li povus fidi ilin. Kaj dume sur lia vizaĝo speguliĝas pli kaj pli da certeco, ke hodiaŭ ili havos sukceson.

Inter militestroj kaj iliaj soldatoj ekzistas neordinare subtila kontakto: ili tuj komprenas unu la alian. Ofte la salutmaniero unuflanke kaj la respondo aliflanke sufiĉas por kreigi reciproka kompreno kaj sindona fido.

— Vi ne kompromitiĝos, ĉu? — jam mem ridante pri tiu ĉi supozo, li ripetas.

— Tute ne. . . Ni estas pretaj. . . — sonas unuvoĉa respondo el la vicoj.

— Atentu, vi ne bezonas fosi ŝim-

kavojn! Vi ne iras por konkeri Plevnen, sed nur por repuŝi la turkojn el iliaj tranĉeoj kaj okupi ilin. Do, atingi kaj resti fikse tie. Nenion pli, ĉu vi aŭdas?

Nun estas jam evidente, ke li legas sur la vizaĝoj de la soldatoj tion, kio estas en iliaj animoj, kaj ke li ne devas timi pri manko de kuraĝo, sed pri superflua ardiĝo.

— Ni penos! . . — kaj ili rigardas ankoraŭ pli gaje, tiel gaje, ke oni eĉ timas pri ili.

— Jes, jes! . . Ĉi tie ne temas pri kuraĝo, sed pri obeo. Kiam la estro diras „Haltu!“, eĉ se vi havus la deziron persekuti la malamikon plu, neniun paŝon antaŭen! Kaj la turkojn vi tute ne devas timi!

— Ni ne timas! . . .

Kaj efektive, oni vidas laŭ iliaj okuloj, ke ili ne timas.

— Jes, jes. . . Ili estas bonaj soldatoj, sed ni estas pli bonaj ol ili. Ĉu vi rememoras Loveĉ, kie ni ilin disbatis? — Kaj lian vizaĝon kvazaŭ trakuras rebrilo. — Ĉu vi memoras, kiel vi ilin persekutis?

— Ni memoras! — sonas gaje el la vicoj; kaj ankaŭ sur la vizaĝoj de la soldatoj lumas gaja brilo.

— Kaj kiel ili timtremis, he? Ili ne atendis tion! Kaj vi ekkriis rekte en iliajn vizaĝojn „hura!“

— Ili forkuros de ni kun sia tuta hordo! — jam siaflanke sin aŭdigas soldato, radiantpro fiero.

— Ĉu vi estis tiam kun mi? . . . Verŝajne vi estas iu el la malnovaj soldatoj?

— Mi kun Via Ekscelenco partoprenis la atakon de la redutoj mem apud Plevnen! — respondis ĉi tiu per voĉo ankoraŭ pli feliĉa.

— Hm, jen do, fratoj, ĉu vi vidas? La tasko ne estas malfacila. Sciu, ke tiuj ĉi samaj pozicioj antaŭe apartenis al ni.

— Ili denove estos niaj, Via Ekscelenco! Ni klopodos pri tio!

Al ni (mi kuratingis miajn soldatojn kaj ekstaris en la vicoj) la ge-



neralo venis iom poste kaj absorbite fiksrigardis niajn vizaĝojn, kvazaŭ volante tralegi, kiel ni kondutos dum la hodiaŭa batalo. Ĉu ni kompromitiĝos aŭ ne? Oni ne povus fidi al la novuloj. Oni devis ion fari por levi la spiriton de la soldatoj. Kaj la generalo ekagis kiel vera milita psikologo.

— Kie estas via maljuna ĉefserĝento? — li demandis, proksimiĝinte al la roto.

Tokmakov eliris el la vicoj kaj stariĝis senmove.

Skobelev atente rigardis lin kaj demetis la ĉapon.

— Riverencon al vi, maljunulo! De ni, de ĉiuj! Estas facile labori kun tiaj agloj!

Poste li turniĝis al ni, la oficiroj:

— En la persono de Tokmakov, sinjoroj, mi vidas la ligon inter la junaj kaj maljunaj militistoj de nia venka armeo. Li estas vivanta modelo de ĝia pasinta glora historio. Ankoraŭfoje riverencon, maljunulo! — kaj li denove levis alte la ĉapon.

— Kie aperas malfacilaĵo, helpu! Kaj atentu: ne permesu, ke oni mortigu nian maljunulon! Se vi restos malantaŭe kaj lin lasos antaŭen kaj perdos lin, poste ne aperu antaŭ miaj okuloj! Mi rifuzos komandi vin!

Skobelev haltas kaj. . . faras krucsignon.

— Viciĝu en fronton! — sonas la komando.

Antaŭ ni larĝe etendiĝas la longa vico de la pafistoj kaj malaperas en la nebulo. Ankoraŭ minuto — kaj ni, eĉ streĉante la okulojn, ne plu vidos ilin. Neaŭdebla estas ankaŭ la bruoj de iliaj paŝoj sur la mola kaj malseka tero.

— Kun Dio! — la generalo mallaŭte diras.

Ni ekiris. . .

Proksimume unu horon ni moviĝis tute mallaŭte. En mia memoro restis malklara impresoj pri montopintoj, kiujn ni lasis post ni, pri valoj, kie ni lasis la malpli kuraĝajn — neevitebla bedaŭrinda detalo de ĉiu batalo! Ni estu justaj — inter ni ili estis tre malmultaj. De ĉiuj flankoj nin ĉirkaŭis griza, densa nebulo. Ofte ni vidis antaŭ ni nenion. La pozicioj de la turkoj ne plu estis malproksimaj. Jen tie ili estas — en la mistera malproksimo. . . Pli ĝuste ni antaŭsentis ilin, ol ilin vidis. . . La koro komencis bati forte. La rigardo penas penetri trans ĉiujn barojn — kaj nebulon, kaj altaĵojn, por vidi, kio nin atendas tie. Ankaŭ mi okulerĉis kaj atente aŭskultis. . . Ĉu ne pafos de tie maldormanta gardostaranto? . . . Sed baldaŭ la nebulo fariĝis ankoraŭ pli densa. . . Ĝi vuallis la nigrajn siluetojn de la apude irantaj soldatoj de nia ĉeno, kaj la antaŭeirantan taĉmenton de volontuloj ni jam delonge ne plu povis vidi, kvazaŭ ili neniam ekzistis! Kaj kia silento! Minaca, kvazaŭ speciale por surprizoj.

— Dank' al Dio! — aŭdiĝas malantaŭ ni.

Mi rekonis la voĉon de Skobelev. „Pri kio li ĝojas?“ — mi pensas kaj ne povas kompreni.

— Dank' al Dio! . . . La batalo pasos sen grandaj perdoj. . .

Subite tamen en tiu ĉi momento aŭdiĝis obtuza sono de unuopa pafo. Ĝi kvazaŭ eniĝis en la koron de ĉiu el ni. Tio ne estas timo, ne. Ĝi estas io tute alia. Ĝi signifas: „Jen, jam komenciĝas, nun, tuj okazos. Tuj! .“

Iu el la turkaj postenantoj estis malkovrinta nin.

(Daŭrigota). El la rusa: R. Korstantinova

Eterne vivu kaj floru la sankta amikeco inter la bulgara kaj rusa popoloj — potenca vivokrea forto de nia certa disvolviĝo sur la hela vojo de socialismo, de komuna bonfarto kaj feliĉo, de sekureco kaj paco en la mondo!



ROZOJ POR JULIJA VREVSKAJA

Peterburgo. La printempo de 1877 jaro. En la ĝardeno de barono Ver-tahovskij floras rozoj. Regas ŝenbruo dum la posttagmezaj horoj. Nur sub la ombro de dika kverko mallaŭte knaras skribilo — belega juna virino skribas leteron. La vicoj sekvas unu post la alia:

„Karega Turgenev!

Instigita de soifo pri sinofero kaj de amo al la turmentata bulgara popolo, mi decidis forveturi al Bulgario. Nun, kiel vi scias, tie estas kruela liberiga milito. La sango de niaj heroaj soldatoj kaj de la bulgaraj volontuloj miksiĝas kaj tiamaniere firmiĝas la amikeco por eterne. Tie, inter la siblado de la kugloj kaj la ĝemado de la vunditoj, finfine mia maltrankvila kapo trovos konten-tiĝon. Mi laboros kiel flegistino. . .

Ĉiam via: *Julija*.”

Baldaŭ ŝi ricevas respondon, kiu plenigas ŝian koron per ankoraŭ pli granda decidemo:

„Mia plej bona kunsento ĉiam estos kun vi dum via malfacila vagado. Tutkore mi deziras al vi, ke la he-

roaĵo, kiun vi komencas, estu laŭ viaj fortoj! . . .

Via ĉiam fidela amiko: *Turgenev*.”

La vagonaro, per kiu Julija vetu-ras al Bulgario, estas plena de rusaj soldatoj kaj oficiroj. Rigardante tra la fenestro de la vagono ŝi rememoras Kaŭkazon kaj ĝiajn monumentajn montopintojn, kie ŝi loĝis du jarojn. Ŝi rememoras ankaŭ la korajn ren-kontiĝojn kaj konversaciojn kun Tur-genev kaj Jugo, la lastajn minutojn de sia edzo — baron Vrevskij, kiu mortis pro siaj vundoj, batalante kontraŭ turka persekutantaro. . .

Forpasas kelkaj tagoj en veturado kaj antaŭ la okuloj de Vrevskaja ek-brilas la akvoj de Danubo. Ŝia koro maltrankvile ekbatas — nur unu akva strio dividas ŝin de Bulgario!

En unu malhela novembra tago baronedzino Julija Vrevskaja alve-nas en Bjala-n. Ĝkviciĝas malfacilaj kaj lacigaj semajnoj, plenigitaj de ŝajna unuformeco de la medicina pro-fesio. La vivo estas malfacila, sed tute ne enua. Ĉiumatene kaj vespere Julija vadas la gluan koton en la mallarĝaj stratetoj de Bjala, kiuj kondukas ŝin al la modesta loĝejo en la domo de avo Ivan Haĝiev. Tie an-taŭ la tremetanta lumo de gaza lampo ŝi skribas leterojn al siaj malproksi-maj amikoj. Ĝis malfrua nokto ŝia fenestreto lumas kiel malgranda stelo en la silentiĝinta urbeto. Sed fruma-tene, antaŭ la matenkrepusko, Ju-lija ekiras al la malsanulejo — duon-ruiniĝinta barako sur la bordo de Jantra, kie ŝin atendas la malsanuloj. Jus ekkrakas la pordo — kaj ĉe la sojlo vidiĝas, rozkoloriĝinta pro la malvarmo, ŝia vizaĝo, la konata pura rideto ekfloras sur la teneraj lipoj, kvazaŭ varma suno lumi gas la palajn fruntojn de la vunditaj soldatoj.



La monumento de J. Vrevskaja en Bjala



Dum januaro 1878, jam infektita de tifo, ŝi ankoraŭ estas inter la malsanuloj. Ŝiaj okuloj estas malsekaj kaj la vizaĝo brulas pro alta temperaturo. Subite ŝi falas senkonscia. Post ŝia malsanico eĉ ne unu kuracisto, pro timo infektiĝi, ekzorgis pri ŝi. Nur la malsanuloj ekstaras kaj akvumas per vivigaj gutoj da akvo ŝiajn lipojn. Ĉe ĉiu guto la okuloj de Julija ekbrilas dankeme.

Je la 5-a de februaro 1878, malprok-

sime de siaj parencoj kaj proksimuloj, Julija Vrevskaja mortas en la manoj de unu malsana soldato.

— Fratino Julija, ĉu vi aŭdas min?— li demandas terurigite.

La malsekaj okuloj suferas malfermiĝas kaj la lipoj apenaŭ flustras:

— Mi mortos! Sed vi ne ploru! Mi estas feliĉa, ke mi donas mian vivon por vi!

Unu amanta kaj sindonema koro ĉesis bati.

Nevena Nedelĉeva

ANTAŬ CENT JAROJ

(vera okazaĵo)

Nun, kiam ni festas la centan datrevenon de nia liberiĝo el sub la otomana jugo, en mia konscio ekstaras klare la figuro de bona, maljuna virino — la duonpatrino de mia patrino, do mia avino. Malgraŭ la maljuneco ŝia vizaĝo estis bela, la voĉo — milda, kaj plej grave — ŝia koro estis bonega. Tial mia patrino kaj ni, infanoj, forte amis ŝin.

Ofte ŝi rakontis al ni pri diversaj teruraj okazaĵoj el la otomana jugo, sed malofte ŝi parolis pri la plej terura evento en sia vivo. Rakonti pri tio mi aŭdis ŝin nur trifoje. Ŝi ĉiam estiĝis mortpala kaj larmoj surverŝis ŝiajn malgrasajn, delikatajn vangojn.

Lastan fojon mi aŭskultis la rakonton pri tiu evento je la dato, kiam antaŭ multaj jaroj ĝi okazis. Eble nia avino sentis bezonon rememori kaj rakonti ĝin. Ni ĉirkaŭis ŝin kaj aŭskultis preskaŭ senpire.

Tra la fenestro penetris la lastaj radioj de la subiranta suno. En la ĉambro estis tute senbrue. Nia avino komencis paroli per mallaŭta voĉo:

—Vi naskiĝis kaj kreskas en libero. Kaj vi devas senti vin feliĉaj, ĉar vi ne scias, kio estas fremda jugo, sklaveco. . . Sub jugo oni ne povas ĝui libere la sunvarmon, la ĝardenojn plenplenajn je fruktoj, oni ne povas trankvile ami siajn gefratojn, gepatrojn, infanojn, ĝui sian junecon, ĉar neniu

estas certa, ke ĝis la vespero la konkerinto ne forprenos ion aŭ ĉion de li.

Tial, kiam venis la rusoj kaj liberigis nian urbon Stara Zagora de otomana jugo, nia ĝojo ne havis limon. Ĉiuj urbanoj — junaj, maljunaj, infanoj — eliris por renkonti la liberigantojn kun floroj kaj fruktoj.

Mi ne scias kial oni elektis min prezenti panon kaj salon al la komandanto de la rusa armeo. Kiel belajn, bonajn okulojn li havis!

Tiam mi estis 19-jara. Apenaŭ estis pasintaj kelkaj monatoj de mia edziniĝo al mia amata Nikola.

Ĉiuj urbanoj donis al la rusoj nutraĵon kaj ĉion, kion ili povis. Sed nia ĝojo ne daŭris longe. Venis granda turka armeo sub la komando de Sjulejman Paŝao. Je la 19-a de julio komenciĝis terura batalo. Ni ĉiuj helpis la batalantojn. Eĉ la infanoj kaj maljunulinoj portis akvon al la soldatoj.

En tiu granda batalo pereis miaj du pli aĝaj fratoj apartenantaj al la tria volontula bataliono sub la komando de vickolonelo Kalitin¹, kiu same tiam pereis.

La turka armeo estis kvaroble pli multnombra ol la nia, kaj malgraŭ la grandega heroeco de la rusa armeo

¹ Tria volontula bataliono, konsistanta el bulgaraj patriotoj, estis komandata de la rusa vickolonelo Kalitin.

kaj de la bulgaraj volontuloj, Stara Zagora denove falis en turkajn manojn. Tiam venis la plej terura tempo por la loĝantoj, kiuj ne sukcesis fuĝi. La turkoj estis transformiĝintaj en sovaĝajn bestojn. Ĉio falis sub iliaj jatananoj².

Multaj homoj, inter kiuj ankaŭ mi, mia edzo, mia frateto kaj mia patrino, kaŝis sin en la preĝejo, esperante, ke la turkoj ne kuraĝos eniri ĝin. Sed male: ili rompis la pordon kaj kun sovaĝa furiozeco enkuris kun nudaj jatananoj. Tiam estiĝis ploregoj kaj kriegoj, kiajn vi ne povas imagi. La patrinoj brakumis siajn infanojn, la fratinoj siajn fratojn — por kaŝi ilin. Sed la turkoj eltiris ilin el ties brakoj kaj mortigis ĉiujn, kiuj estis de vira sekso — plenaĝaj homoj, junuloj, knabetoj.

Mia amata Nikola genuis antaŭ mi, metis la kapon sur miajn genuojn kaj brakumis min forte. Mi estis kliniĝinta super li por kaŝi lin per mia korpo, manpremante lin. Sed du fortaj manoj kaptis miajn ŝultrojn, perforte disigis miajn manojn. Mi vidis antaŭ mi terurajn, sangajn okulojn. En la sama momento alia turko svingis jatananon kaj detranĉis la kapon de Nikola, kiu restis sur miaj genuoj, dum la korpo falis teren. Sango elŝprucis kiel fontano. Mi ekkriis, kaj ĉio malaperis antaŭ mi. . .

Kiam mi malfermis la okulojn, ĉe mi staris maljuna virino. Mi ne povis kompreni, kie mi troviĝas, kiu estas tiu maljunulino kaj kio okazis. Mi sentis min preskaŭ morta, kvankam mi paŝis en la kabano, kie ni loĝis, kaj nutris min. Mi ne povis rememori,

kiu mi estas, nenion mi povis rememori el mia antaŭa vivo.

Foje eniris la kabanon malgranda knabeto. Mi fikse rigardis lin kaj ŝajne mi komencis vekigi. En la sama momento venis en mian konscion la penso, ke mi havis frateton. Jes, mi havis frateton! Sed kie li estas nun? Li estis kune kun mi kaj mia patrino en la preĝejo. . . Kaj tuj antaŭ miaj okuloj aperis la tetura bildo — la tranĉita kapo de Nikola. Mi ekkriis kaj svenis. . .

La tagoj plenaj je senfina doloro moviĝis malrapide, sed fine post la granda batalo ĉe montopinto Sveti Nikola³ la turkoj estis venkitaj, kaj Stara Zagora denove liberigita. Malgraŭ ke ĝi estis tute forbruligita, ni revenis al ĝi. La vundoj iom post iom resaniĝis. La homoj komencis konstrui novajn domojn. Tiam mi vidis, ke la vivo estas pli forta ol la morto.

Mi ne povas rememori ĝuste, kie kaj kiam mi renkontis vian avon. Tiam li estis juna, sed sola kiel mi, kun tute malgranda filineto — via patrino. Vi ne povas imagi, kiel belega knabineto estis via patrino! Tuj mi ekamis ŝin. Sed ĉiam mi pensis kaj pensas pri mia frateto. Neniu lin vidis. Ĉu li estis mortigita aŭ ne? Tiam li estis 7-jara. Mi ne scias, de kie venis al mi la espero, ke li estas viva. Eble pro tio, ke neniu trovis lian tranĉitan kapon, aŭ ĉar mi volis, ke li estu viva?

Avinjo eksilentis. Post longa paŭzo ŝi diris:

— Fine ni estis liberaj. La libereco estas pli kara ol ĉio ajn, kaj la fremda jugo — plej terura afero. Gardu la liberecon!

— — — — —
La suno subiris. En la krepusko la vizaĝo de avinjo estis tute pala. Ŝi ekspiris profunde, stariĝis kaj iris al la ikonostazo por lumigi la lucernon. Tion ŝi faris ĉuivespere, por ke estu

Kruelaĵoj de turkoj kaj ĉerkesoj en Bulgario



lumigita la vojo de ĉiu pereinta ruso kaj bulgara volontulo.

Nun ni ne lumigas ordinarajn lucernojn, sed la plej belajn, vivajn, sank-

² Jatagano — mallonga kurba sabro.

³ Nun montopinto Stoletov.

tajn lampetojn — niajn korojn. En ili lumas nia granda amo. Kaj tiu amo, eliranta el ĉiuj koroj, kuniĝas en la suno, kiu briligis por ĉiam la nomojn de ĉiuj konataj kaj nekonataj herooj, pereintaj por nia libereco.

Ŝipka, aŭgusto 1877

Generalo Stoletov

Memoru, bravuloj, ke tuta Rusio esperas je vi — ke vi findefendos la Pasejon de Ŝipka, kaj Bulgario atendas de vi sian liberecon. . .

Nemiroviĉ—Danĉenko

Ĉiu nia soldato estis heroo en tiu tago. Timuloj, malkuraĝaj re estis. . . La bulgaraj batalionoj same tiel tenis sin mirige. Foje 15 bulgaroj forpuŝis kaj ekpersekutis 180 turkojn. . .

Linioj de partoprenintoj

La rusaj soldatoj certigadis la bulgarojn: ni ĉiuj falos. . . eĉ la lasta el ni pereos. . . Ni formortos, sed vin ni ne lasos sub la jugo de la turkoj!

Vicon post vico pereadis la defendantoj de la pasejo aŭ falis sub la battoj. Spanon post spano la spaco transiris en la manojn de la malamiko, kiu obstine antaŭeniris en proporcio 20 kontraŭ 1.

Nin konsolis nur la penso, ke se la helpaj trupoj malfruos, ni devas lasi ninjn ostojn digne, defendante la pozicion, ĉirkaŭitan de ĉiuj flankoj.

La kolonoj de la malamiko renoviĝadis ĉiun minuton, dum la niaj mortadis sur siaj postenoj maldensiĝante, kiel kampo maldensiĝas antaŭ la falĉilo. . .

ORGANIZA VIVO

VERDA TABULO

En la abonkampanjo de «Bulgara Esperantisto» por 1978 j. multaj estaroj superis la siarigitan antaŭ ili plan-ciferon, sed bedaŭrinde kelkaj ne faris tion kaj nia organo ankoraŭ ne atingis 6100. Jen kelkaj bonegaj rezultoj, parolantaj pri plena mobilizo de la fortoj, pri konkrete planita kaj bone organizita abonkampanjo, pri multe da entuziasmo kaj amo al nia organo kaj al Esperanto:

Distriktoj

Distrikto Smoljan — 549 abonoj.
Aparte notindaj E-societoj:

u. Dospat — kun prezidanto Emil Ĉirpanski — 237 abonoj

u. Nedelino — kun prezidanto Vasil Petrov — 76

u. Smoljan kun prezidanto Rumen Bukov — 77

u. Smoljan — kv. Rajkovo — kun prezidanto Vasil Frenkev — 47

u. Ĉepelare — kun prezidanto Dimitro Marev — 30.

Distrikto Varno — 224 abonoj.
Notindaj E-societoj:

«Fajrero» — ĉe la Distrikta Popola Soveto — kun prezidanto s-ino Markrid Karajan — 125 abonoj

«Albatroso» — Varno — kun prezidanto Georgi Cvetkov — 88.

E-societoj

E-societo „Kolombo de la paco“ en u. Gălâbovo, distrikto Stara Zagora — kun prezidanto Kanjo Kanev — 83 abonoj.

E-societo „Progreso“ — u. Polski Trâmbeŝ, distr. de Veliko Târnovo — kun prezidanto Hristo Manolov — 43 abonoj.



Individuaj distinguloj:

Dimitro Ivanov el Plovdiv — 158
abonoj

K-do Ivanov kolektis ankoraŭ: por «Scienca Mondo» 19 abonojn, «Paco» — 8, «Pola Esperantisto» — 3, «Hungara Vivo» — 2. Krome li kolektis la membrokotizon de 109 s-anoj.

Emil Ĉirpanski el u. Dospat — 135 abonoj.

Sekvu la ekzemplon de tiuj ĉi distriktoj kaj samideanoj! Plue abonigu al „Bulgara Esperantisto“! Monon sendu al la asocia kancelario! En la jaro de la 63-a UK kaj la 34-a TEJO-Kongreso ni nepre atingu 6100!

E-KURSOJ

Gabrovo. Funkcias tri kursoj:
en la Domo de Kulturo — 12 kursanoj, gvidanto Djanko Minĉev;
en la Distrikta Apoteka Administracio — 11 kursanoj, gvidanto Petko Totev;
en la Supera Maŝin-Elektra Instituto, sekcio „Informado kaj internaciaj ligoj kun demokratia junularo“ (en la fakultato pri sociaj profesioj) — 12 studentoj, gvidanto Ljubomir Dimitrov (simila sekcio estas rekomendinda formo de agado en ĉiuj superaj lernejoj).

L. Dimitrov

Sofio. Per tuturba kunveno de E-societo „M. Gorkij“ solene finiĝis du E-kursoj — por komencantoj (lektoro Mihail Elenov) kaj por progresintoj (lektoro Simeon Hesapĉiev). La

lektoroj raportis koncize pri la laboro de siaj kursoj. La gekursanoj prezentis tre belan art-programon en Esperanto. Ili recitis, rakontis humuraĵojn, kantis.

Ĉiuj kursanoj fariĝis membroj de diversaj E-societoj, kelkaj aliĝis al la Kongreso de TEJO en V. Târnovo kaj UK de Esperanto en Varno. Ĉiuj daŭrigas studadon de la lingvo en la sekva, pli alta grado kun decido nepre fariĝi bonaj esp-istoj.

Z. Oŝanska

Velingrad. Funkcias 5 kursoj:

1. Por komencantoj — 15, gvidanto Manol Ĉolev;

2. Por progresintoj — 16, gvidanto Dimitro Ĵdrakov;

3. Fakultativa klaso en Unua baza lernejo — gvidantino Petranka Koprivlenska;

4. Fakultativa klaso en Unua baza lernejo — gvidantino Venera Langeva;

5. Fakultativa kurso en III baza lernejo — gvidanto Ivan Sergeev (infana blovorkestro).

Samokov. Elementa kurso por 12 gejunuloj, gvidanto Vasil Trifonov, advokato.

En niaj korespondaj kursoj nun

Ekde la komenco de la nova lernojaro al la korespondaj E-kursoj aliĝis 90 gekursanoj. Unuan lokon okupas Ruse — 25 personoj. Sekvas: Burgas — 7, Blagoevgrad — 6, Pazarĝik kaj Silistra — po 5, Sofio, Plovdiv, Varna — po 4, Kjustendil, Vidin, Vraca, Kârĝali, Stara Zagora — po 1. Eĉ ne unu kursano estas el la distriktoj Pleven, Sumen, Loveĉ, Tolbulin.

La distriktaj kaj societaj estraroj mobilizis siajn fortojn kaj varbu novajn kursanojn! La kurskotizo por ĉiuj gradoj estas tute modesta: 12 levoj. Sumojn sendu al:

D. S. Kasa Blagoevski rajon, smetka 185/2553 na Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo, 1303 Sofia.

Vintraj feriaj kursoj en Vraca

De la 3—9 de januaro en Vraca okazis la vintraj feriaj E-kursoj. Partoprenis 25 personoj el la lando. Kursgvidantoj: Kiril Velkov el Vraca — I grado, Violin Oljanov — II grado, Kunĉo Vălev — III grado.

Ĉiutage la kursanoj havis po 5 studhoroj. Posttagmeze — ripozo, mempreparo, promenadoj, amuzoj. Oni vizitis la Kemian Kombinatton, renkontiĝis kun la lokaj esp-istoj.

Fine de la kursoj okazis ekzamenoj. Sukcese faris ilin: por la I grado — 3 samideanoj, por la II grado — 1, por la III grado — 5.

Komence de aprilo same okazos unusemajn feriaj E-kursoj. La loko kaj la ĝusta dato sciigotaj.



LAŬDINDE!

E-societoj, kiuj en 1977 j. varbis pli da membroj ol en 1976. (La ciferoj en krampoj rilatas al 1976 j. La ordo — alfabeto laŭ distriktoj).

Petriĉ — E-societo „ <i>Esperanto Triumfonta</i> “	— 34 (22)
Veliko Târnovo — E-societo „ <i>Lumo</i> “	— 49 (34)
Velingrad — E-societo „ <i>Stoju Kalpazanov</i> “	— 42 (40)
Nova Zagora — E-societo „ <i>Edmond Privat</i> “	— 25 (15)
Popovo — E-societo „ <i>Homeco</i> “	— 24 (16)

ZAMENHOF—CELEBROJ

Sofio. Post solena kunveno, dediĉita al la aŭtoro de Esperanto, la estraro de E-societo „M. Gorkij“ organizis belan amuzvesperon.

Je la 16 decembro kolektiĝis centkvindek esp-istoj en restoracio „Pautalia“, kiu montriĝis nesufiĉa por akcepti pli da dezirantoj. La salono estis bone ornamita per flagetoj, sloganoj, murkarikaturaj, standardoj. Meze de la centra muro brilis granda verda stelo — signo, ke tie ĉi estas esp-istoj. Floroj kaj pinverdaĵo freŝigis la tablojn. Aktivulinoj bonvenigadis la gastojn ĉe la enirpordo, pendigante sur ties brustoj verdajn rubandojn. Agrabla muziko, karaj renkontiĝoj kreis amikan atmosferon.

Post bongusta vespermanĝo la prezidanto de la societo Ivan Keremidĉiev salutis la ĉeestantojn per varmaj amikaj vortoj. La kursaĵoj de k-doj Mihail Elenov kaj Simeon Hesapĉiev plenumis belan artprogramon en Esperanto. La humoro plialtiĝis. El ĉiuj anguloj komenciĝis kantado. Dancoj, rondodancoj, nacia „râcenica“ plezurigis la ĉeestantojn.

Z. Oŝanska

Jambol. La Zamenhof-celebro okazis en montodomo „Druĵba“ (Amikeco) sur la monteto Bakaĝici, proksima al la urbo. Ĉeestis multaj esperantistoj. Raporton pri la vivo kaj agado de Zamenhof faris Dîmo Trudoljubov. En belarta programo partoprenis Mira Nedelĉeva, Sn. Paŝankova, Radka Janĉeva, Zaf. Ivanova, N. Kostova, Mit. Stojanova, R. Atanasova, Galja Georgieva, kiuj recitis versaĵojn de Zamenhof kaj aliaj poetoj. R. Janĉeva plenumis popolkanton. Penka Papazova kaj Krasimira Banova legis proprajn versaĵojn. Sekvis dancoj, amuzado.

St. Bakalova

Kazanlâk. La solenan kunvenon ĉeestis ĉ. 70 esp-stoj, precipe junularo. Raporton pri la vivo kaj afero de Zamenhof faris Neli Cankova, instruistino. Sekvis belarta programo, kiun prezentis la klaso de N. Cankova.

Nova E-societo

La 5-an de decembro 1977 en v. Slavjanovo, distrikto de Târgoviște, fondiĝis esp-ista societo surbaze de funkcia kurso ĉe la popola legejo. Al ĝi oni donis la nomon de la pereinta en la antifaŝista batalo esperantisto Ivan Stojanov. La nova societo havas 14 membrojn. Estraro: prezidanto Ilija Mirĉev, sekretario Beja Jumurtova, estraranoj Ivan Denĉev, Stojan Dimov, Belka Stambolova.

„Mondamikeco“ raportis la unua

La 2-an de januaro ĉ. j. E-societo „Mondamikeco“ — u. Ĉirpan, la unua en la distrikto de Stara Zagora raportis pri 41 regule kotizintaj membroj por 1978. Brave! Imitinda ekzemplo por la jaro, kiam la mondamikeco de la esp-stoj vere triumfos en Varno kaj Veliko Târnovo!

Strato „D-ro Zamenhof“ en Gabrovo

La Urba Popola Soveto en Gabrovo donis la nomon „D-ro Zamenhof“ al la ĝisnuna strato „Transportna“.

E-prelego por kulturagantoj

Je la 21-a de decembro 1977 la Klubo de Kulturagantoj en Vidin organizis kunvenon, en kiu Kunĉo Vălev — sekretario de BEA prelegis je temo „Esperanto — ilo de la internacia kultura interŝanĝo“. Ĉeestis kulturagantoj kaj lokaj esp-stoj. Parolinte pri la problemoj de internacia lingvo kaj pri Esp-to kiel ĝia plej bona solvo, la preleginto substrekis, ke la rolo de Esp-to en la internacia kultura interŝanĝo senĉese kreskas. Aparte notindaj estas ĝiaj sukcesoj en la literaturo, gazetaro, radio. Abundas teatraj kaj muzikaj manifestaĵoj enkadre de universalaj kaj naciaj E-kongresoj, festivaloj, renkontiĝoj ka.

Terz.

La Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris per ordeno «Naŭa de Septembro» — III grado k-don LJUBEN GROZDANOV lige kun lia 60-jariĝo pro lia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo kaj en la konstruado de socialismo.

La 19-an de decembro 1977 en Sofio, en la granda salono de la Bulgara Akademio de Sciencoj, okazis impona celebrazo de nia sam-



deano Vasil Bozarov lige kun lia 70-jariĝo. La solena kunveno estis organizita de la Ministerio de Popola Klerigo, CK de la Unuiĝo de Bulgaraj Instruistoj, La Centro de Scienco kaj Perfektigo de Pedagogiaj Kadroj kaj la Bulgara Naturesplora Societo. En la salono ĉeestis kelkcenta publiko, plejparte pedagogoj.

La solenaĵo estis malfermita de Prodan Stojanov — vicministro de la popola klerigo, kiu tralegis salutleteron de k-do Todor Ĵivkov al la jubileulo.

Raporton pri la vivo kaj riĉa agado de Bozarov faris akademiano Sava Ganovski. Li pentris la imponan portreton de tiu neŝancebla kontraŭfaŝisma batalinto, multjara aganto sur la kampo de bulgara popola klerigo kiel instruisto, lernejestro kaj funkciulo de la Ministerio de Popola Klerigo. Aparte li notis lian agadon kiel scienclaboristo, fakulo pri la

metodiko de instruado de biologio. Al li apartenas pluraj sciencaj verkoj kaj popularsciencaj artikoloj. Dek sep jarojn V. Bozarov estis ĉefredaktoro de revuo „Priroda i Znanie“ (Naturo kaj Scio), 20 jarojn — membro de la redakta komitato, vicĉefredaktoro kaj ĉefredaktoro de revuo „Biologija i Himija“ (Biologio kaj kemio), kia li estas ankaŭ nun. Pli ol dek jarojn Bozarov estas vicedirektoro de la Instituto pri Instruado „Todor Samodumov“. La raportanto menciis ankaŭ la E-agadon de Bozarov.

Sekvis multnombraj salutoj de organizaĵoj kaj institutoj. Oni enmanigis al la jubileulo multege da florbukedoj kaj florkorbetoj, memordonacojn. Estis salutoj de: Draĵa Vâlceva — Ministro de Popola Klerigo (legis ĝin vicministro docento Al. Gjonov), Ani Spanĉeva — prezidantino de la Unuiĝo de Bulgaraj Instruistoj, la Instituto pri Instruado „Todor Samodumov“, la Asocio de Bulgara-Sciencistoj — sekcio de filozofio kaj pedagogio, la komunuma komitato de BKP el v. Pravec — la naskiĝloko de Bozarov, la Urba Komitato de BKP en Letnica, distrikto de Loveĉ, kie li ok jarojn estis direktoro de la gimnazio, ka.

En la nomo de la Bulgara E-Asocio salutis la jubileulon Kunĉo Vâlcev, sekretario. Li rakontis, ke k-do V. Bozarov fariĝis esperantisto jam 16-jara — kiel gimnaziano en Orhan'e (nun Botevgrad). Tie li estis sekretario de la lernejana E-societo „Verda Radio“. Ĝis la tago de liberigo el sub la faŝismo — 9. IX. 1944 — Bozarov estis instruisto en multaj lokoj de nia lando kaj ĉie li propagandis kaj disvastigis Esp-ton. En 1968 j. li estis elektita kiel prezidanto de la Instruista Sekcio de Bulgara E-Asocio, kia li estas ĝis nun. Al la jubileulo estis enmanigita horloĝo kun E-surskribo.

Al ĉiuj gratulintoj Bozarov respondis per varmaj vortoj.

K Ivanov

LIBANA ESPERANTO-INSTITUTO (ASOCIO) — P. O. Box 11-9254, Beirut, Libano

La sovaĝa milito dum du jaroj detruis, bruligis kaj ruinis la tutan Libanon, lasante milojn da viktimoj kaj grandegajn perdojn.

Ni sciigas ĉiujn gefratojn, ke ankaŭ la centra oficejo de Esperanto en nia lando, kiu situas en la centro de Beirut, estas detruita kaj bruligita kune kun ĉiuj dokumentoj, libroj, mebloj, skribmaŝinoj.

Ni petas, ke vi helpu ĉiamaniere, por ke ni povu reorganizi novan oficejon de sukcesa

E-movado en Beirut.

Por faciligi al vi sendi monhelpon, ni malfermas konton ĉe Banko: Libano, Beirut, The Royal Bank of Canada, Middle East, Dora—Branch, konto n-ro 161.00.05499 prof. Salah Ghanem.

Ni akceptas donacojn ĉiaspecajn kaj sendos dankleterojn kaj memorpremiojn al ĉiu helpinto.

Ni antaŭdankas vin! Vivu Esperanto!
Prezidanto de LEIA: *prof. S. Ghanem*



AL K-DO VASIL ĤRISTOV BOZAROV SOFIO

Kara kamarado Bozarov,

Kun aparta ĝojo mi salutas vin lige kun via rimarkinda 70-a datreveno de la naskiĝo, 50-jara fruktodona krea vojo kaj via honorigo per la alta titolo «Heroo de la Socialisma Laboro».

Liginte en plej frua aĝo vian vivon kun la laborista klaso kaj penetrita jam en juneco de la komunismaj ideoj, vi fordonis ĉiujn viajn fortojn en servo al la Partio kaj la popolo. Kaj kiel instruisto, kaj kiel scienclaboro-

risto, kaj kiel gvida funkciulo en la Ministerio de Popola Klerigo, kaj kiel multjara vic-direktoro de la Sciencesplora Instituto de Instruado «I. Samodumov» vi laboris sindone kun la specifa por vi ardo kaj konscienco por la triumfo de nia granda afero.

El tuta koro mi deziras al vi, kara kamarado Bozarov, firman sanon, por labori samtiel sindone por florado de nia nacia klerigo, por nia socialisma Patrolando.

19 de decembro, 1977 j.

T. Jivkov

Lige kun la 70-jariĝo de la Popola Instruisto VASIL ĤR. BOZAROV la Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris lin per la alta titolo «Heroo de la Socialisma Laboro» pro lia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo kaj pro liaj meritoj en la disvolviĝo de la popola klerigo.

AKAD. VLADIMIR GEORGIEV 70-JARA

Je la 3-a de februaro 1978 la fama bulgara lingvisto Vladimir Georgiev — arda amiko de Esperanto, atingis gravan datrevenon — sian 70-jariĝon. Pro siaj altvaloraj sciencaj verkoj kaj fruktodona scienca agado li estas tutmonde konata.

Akad. Vl. Georgiev enkondukis novan manieron de apliko de la kompara-historia metodo en la lingvoscienco. Per tiu metodo li pruvis la ekziston de antikva pralingvo sur la Balkana Duoninsulo, kiun la specialistoj nomis „Georgiev-Lingvo“. Li estas unu el la unuaj, kiuj donis sukcesan kontribucion por deĉifro de la Kreta-Mikena Skribo. Al lia plumo apartenas multaj studoj, skribitaj ĉu en bulgara, ĉu en rusa, ĉu en germana aŭ franca lingvoj. Ni citu nur kelkajn: „Antaŭgreka lingvistiko“, „La traca lingvo“, „Demandoj de la bulgara etimologio“, „Studoj pri kompara-historia lingvoscienco“, „La malnova toponimio de la Balkana Duoninsulo kaj la Mediteranea Tezo“, „Hetita kaj etruska lingvoj“, „Bulgara etimologio kaj

onomastiko“, „La du lingvoj de la Kretaj Surskriboj en Linearo A“ ka.

Akad. Vladimir Georgiev estis multjara profesoro en la Sofia Universitato „Kliment Ťhridski“ kaj ties rektoro, same vicprezidanto de Bulgara Akademio de Sciencoj. Li estas doktoro de la Universitato de Vieno kaj honora doktoro de la Universitato de Berlino.

Kun Esperanto akad. Georgiev konatiĝis en sia junaĝo kaj restas ĝia fidela amiko ankaŭ nun. Li estas membro de la redakta komitato de revuo „Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado“. La fakultativa instruado de Espo en la Sofia Universitato, kiu ekde 1963 j. funkcias ĉe la katedro de ĝenerala lingvistiko, de li gvidata, ŝuldiĝas plejparte al lia granda scienca aŭtoritato.

Al la eminenta amiko de Esperanto akad. Vl. Georgiev ni deziras longan vivon, sanon, feliĉon kaj pluan fruktodonan sciencan laboron!

Jen fragmento (en bulgara kaj Esperanto) el la intervjuo kun li, publikita en n-ro 6/1963 de „Bulgara Esperantisto“ :

Mi estas arda defendanto de Esperanto kaj mi opinias, ke ĝi devas trovi plej indan akcepton en nia vivo. En la internacia kongreso de lingvistoj en Parizo 1948 jaro mi parolis pri la disvolviĝo de Esperanto kaj defendis

Аз съм горещ защитник на есперанто и смятам, че той трябва да намери най-достоеен прием в нашия живот. На международния конгрес на езиковедите в Париж през 1948 г. говорих за развитието на есперанто и

la ideon pri ĝia enkonduko en la lernejojn egale kun la ceteraj fremdaj lingvoj. En tiu rilato mi trovis subtenon de elstaraj sovetaj, francaj, ĉinaj kaj italaj lingvistoj.

Por ni, bulgaroj, same por la popoloj de Azio, Afriko, la skandinavaj landoj ka., Esperanto estas lingvo tre facile alproprigebla kaj sukcese uzebla por kreo de internaciaj ligoj. Kompare kun Esperanto lingvoj kiel la angla, la franca ka., akirintaj la kvaliton de internaciaj, estas pli malproksimaj al la vortfonduso de la slavaj popoloj, kaj oni ilin malfacile ekregas. Por tiuj popoloj Esperanto estas plej efika rimedo por komuniĝado inter la popoloj. Oni devas substreki, ke kompare kun ĉiu ajn nacia lingvo Esperanto estas plej rapide kaj facile lernebla ankaŭ de homoj kun malalta lingva kulturo.

Laŭ mi, nun la ĉefa tasko estas instrui Esperanton amase en kursoj kaj rondetoj por pruvi ĝian facilan alproprigeblecon kaj efikecon. Instruado de Esperanto povas esti enkondukita en unu-du el la superaj klasoj de la mezlernejoj dufoje semajne, ĉar oni devas havi antaŭvide la troŝargitecon de la instruprogramo. La rezultoj sendube estos pozitivaj, kaj tio estos serioza argumento favore al Esperanto.

Plej bone estus, se UNESKO rekomendus al la ŝtatoj-membroj de UNO enkonduki instruadon de Esperanto almenaŭ en po unu klaso de ĉiuj lernejoj. Tio estos eksterordinare grava paŝo kaj kontribuo al la komuniĝado de la popoloj, al la interŝanĝo de ĉiaspeca informaĵo.

La abonkampanjo de „Bulgara Esperartista“ por 1978 daŭras plu, ĉar certa kvanto restis nekovrita. Ni insiste petas la distriktajn kaj societajn estrarojn kolekti energie novajn aborantojn kaj sendi la abonkotizojn al la kancelario de BEA. Ni nepre atingu 6100!

защитих идеята да се въведе неговото изучаване в училищата наравно с другите чужди езици. В това отношение намерих подкрепата на известни съветски, френски, китайски и италиански езиковеди.

За нас, българите, а така също и за народите от Азия, Африка, скандинавските страни и др. есперанто е език, който може да бъде много леко усвоен и използван с успех за установяване на международни връзки. В сравнение с есперанто езици като английски, френски и др., придобили качеството на международни, са подалечни от речниковия фонд на народите от славянската група и потрудно се усвояват. За тези народи есперанто е най-ефикасно средство за общуване между народите. Трябва да се подчертае, че в сравнение с който и да е национален език есперанто може да се научи най-бързо и най-лесно и от хора с малка езикова култура.

Според мен, главната задача сега е да се изучава есперанто масово в курсове и кръжоци, за да се потвърди неговото леко усвояване и неговата действеност. Изучаването на есперанто би могло да се въведе в един-два от горните класове на средните училища два часа седмично, като се има предвид претрупаността на учебната програма. Резултатите ще бъдат несъмнено положителни, а това ще бъде сериозен аргумент в полза на есперанто.

Най-добре би било, ако ЮНЕСКО препоръча на държавите-членки на ООН да въведат есперанто най-малко в по един клас във всички учебни заведения. Това ще бъде извънредно важна стъпка и принос в общуването на народите, в размяната на разнообразна информация.



Verdaj steloj

Ljudmila Paspaleeva

RETURNEN! . . . MALDEKSTRAN! . . . MALDEKSTRAN!

En la muzeo de urbo Târgoviște estas konservitaj infanpenetraĵoj — la nuraj el la Rusa-Turka Liberiga Milito. Al ilia aŭtoro — malgranda nekonata pentristo, mi dediĉas mian rakonton.

Prujno algluiĝadis sur la peltĉapo de la knabo kaj la spiro frostiĝadis. Sed al li estis varme, kiel hieraŭ vespere — pro la teo.

Meze de la vilaĝplaco la vilaĝanoj estis ĉirkaŭintaj la rusajn soldatojn kaj ne povis satĝoji pri ili. La vilaĝanoj rakontis kiel la bejo forkuris kune kun siaj edzinoj kaj la incitema bejido. La soldatoj parolis ion ruslingve kaj ridis. Iu soldato demandis lin pri la nomo.

— A-a, Vanja! — li karesis la knabon, kompreninte, ke tiu nomiĝas Ivan. — Mi ankaŭ! — La soldato ekridis sub siaj blondaj lipharoj kaj frapetis sian bruston.

Tiu ĉi nekonata homo tiel bele kaj milde nomis lin Vanja!

— Nu! — transdonis al li la soldato sian akvuĵon kaj de tie blovetis al li nekonata dolĉaodoro. En la korpo de la knabo disverŝiĝis agrabla varmo. Neniam li trinkis tiaĵon.

La tubo de la milita kampkuirilo ankaŭ nun fumis super la vilaĝplaco kaj montris, ke la teo jam estas preta. Kiel Vanja volis ree trinketi de ĝi kune kun la soldato!

Ĉirkaŭe denove kolektiĝis vilaĝanoj, kiel hieraŭ. Dum Ivan trabatis al si vojon, la rusa rajdpatrolo ekgalopis antaŭen en la nebulo. Sur la vilaĝplaco, vicigitaj, atendis la ceteraj soldatoj.

— Vanja! — ekkriis Ivan.

— Adiaŭ! — respondis la soldato el la vicoj.

— Returnen! — ordonis la estro flankestarante. — Maldekstran! . . . Maldekstran! . . . — Kaj li ekmarŝis.

— Kial ili foriras? — rigardis Ivan al avo Ganĉo por helpo.

— Por ni ili batalos! — diris la maljunulo. — Por forpeli la malamikon!

Du larmetoj ekfrostiĝis sur la vangoj de la knabo.

— Ke ili revenu vivaj! — krucsignis avino Radka.

Ivan iris al la lernejo kaj ĵus li eniris, venis la instruisto, kaj ili ree komencis legi de la abocolibro, kvazaŭ kantis:

— Az. . . — a. Buki. . . — b¹.

Ivan ne aŭdis siajn kunlernantojn. Li nur ripetadis:

— Mi volas, ke ili estu vivaj! Li eĉ ne aŭdis, kiam la instruisto diris:

— Aŭskultu, kion alian mi diros al vi! Ne ŝiru la novan abocolibron, he! Ne malpurigu ĝin, ne skribaĉu sur ĝi! Ja ĝi ne kostas malmulte! Tri groŝojn! Se mi vidus iun skribaĉi, mi batos lin per tiu ĉi vergo kaj ŝiros liajn orelojn. Tiel vi sciuj!

La lernantoj, levinte kapojn, atente aŭskultis.

Nur Ivan sidis kliniĝinta kaj lia mano rapide moviĝis. La instruisto direktiĝis al li kaj lia voĉo timtremiĝis lin.

— Mi volas, ke ili estu vivaj! — eksaltis Ivan kaj flankeniĝis por eviti la vergon, sed ĝi subite malleviĝis kune kun la mano de la instruisto.

Sur la lasta blanka paĝo de la abocolibro marŝis rusaj soldatoj kun dorsakoj, kun pafiloj kaj lancoj.

— Bone vi pentris ilin! — per neatendite mola voĉo ekparolis la instruisto. — Brave! — Kaj li levis la abocolibron, por ke ankaŭ la ceteraj lernantoj vidu ĝin.

La penetraĵoj restis sur la abocolibro. Nur kiam Ivan lernis la literojn, li aldonis supre:

— Returnen! . . . Maldekstran! . . . Maldekstran! . . .

¹ Az, buki — la nomoj de la unuaj du literoj de la malnov-bulgara alfabeto (a, b).

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

INTERNACIAJ KURSOJ POR INSTRUISTOJ KAJ KURSGVIDANTOJ DE ESPERANTO

7—26 de aŭgusto, Burgas, ĉe Nigra Maro

A. Por lernado de la lingvo:

I grado, II grado, III grado

B. Por instrurajto de Esperanto

En la kursoj estas akceptataj preferere **instruistoj kaj kursgvidantoj** (neprofesiaj E-instruistoj). La akcepto en ĉiu kurso estas surbaze de dokumento pri ekzameno por la antaŭa grado.

Ĉiutage estas 4 lernohoroj, la ceteran tempon oni uzas laŭplaĉe (sur plaĝo, en promenadoj, ekskursoj ktp).

Limtempo de aliĝo: 31 de majo.

Kotizo por eksterlandanoj: 110 bulgaraj levoj aŭ egalvaloro (por nutrado, loĝado, instruado, administrado).

Sumojn sendu al: *Bulgario, Sofio, ĉrez Bâlgarska Vânsnotârgovska Banka do D. S. Kasa Blagoevski Rajon, smetka 185/2553 na Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo, bul. Ĥr. Botev 97.*

En la komunloĝejo oni ne akceptas infanojn aŭ nekursanojn.

Detalajn informojn petu de: *Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo, bul. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario.*

Venu perfektigi en Esperanto en agrabla esperantista medio. Venu ĝui la varman bulgaran sunon kaj la ĉarmon de la Nigra Maro!

ЕСПЕРАНТСКИ КУРСОВЕ И ПОЧИВКА В ДРУЖЕВО

Ежегодно през летните месеци Софийското окръжно ръководство на Българския есперантски съюз и Българска есперантска кооперация организират за ученици и граждани курсове и почивка в есперантската лагер-школа край с. Дружево, Балкана.

Тази година ще има следните смени:

За ученици

I смяна: 12—25. VI

III смяна: 14—27. VII

II смяна: 28. VI—11. VII

IV смяна: 7—20. VIII

За граждани

V смяна: 22. VIII—4. IX

VI смяна: 7. IX—20. IX

Курсова такса за всяка смяна — 25 лв. Лекторите не плащат такса.

Срокове за записване: за учащи се — 30 април, за граждани — поне 1 месец преди започване на смяната, за която кандидатствуват.

Адреси. За кореспонденция: Софийско окръжно ръководство на Българския есперантски съюз, п.к. 66, 1000 София.

За изпращане на суми: ДСК Благоевски район, сметка 185/2553 на Софийското окръжно ръководство на Българския есперантски съюз.

Учители и родители-есперантисти, изпращайте вашите ученици и деца в есперантската лагер-школа край с. Дружево. Там чрез учебни занятия, песни, програми и забави на есперанто, в игри и разходки те ще се усъвършенствуват по езика и преди всичко в говорното му овладяване, ще се възпитават в есперантски дух и същевременно ще укрепват физически сред дивната балканска природа.